— Restas **jur'** el **jurist'** de la Ekzercaro. Kiu el ambaŭ estas fundamenta?

La opinioj malsamas: S-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker skribas: „Estas vere, ke ni povas konsideri *„juristo”* kiel kunmetaĵon de *„jur'”* kaj *„-ist'”*, kaj tiam fakte *„jur'”* estas jam fundamenta.” ... Sed Prof. G. Waringhien diras: *„jurist'”* ne devas esti analizita en *„jur'”*: tre certe. en la ideo de Z. tio estis unu „fremdvorto” kiu estis malkomponita nur poste, kaj ne de Z. mem.”

Andreo ALBAULT.

408.92
*E 3-5 : E 82E*

## LA ĜUSTA TEKSTO DE LA EKZERCARO

Komparante la tekston de la *Ekzercaro* entenata en la oka eldono de la *Fundamento* (1931) kun la teksto entenata en Wackrill *(Konkordanco al la Ekzercaro.* 1907), mi konstatis ke estas kelkaj diferencoj inter la du tekstoj: mi notis naŭ el ili. Ili estas tre diversaj en sia graveco, sed ĉiuj povas helpi por fiksi la ĝustan tekston.

Por ĉiu el tiuj naŭ diferencoj mi komparis kun la tekstoj liveritaj de du aliaj eldonoj de la Fundamento: la Greka (1907) kaj la Itala (1907).

Jen, koncize, la rezulto de tiu esploro. (Mallongigoj uzitaj:

8 = Oka Eldono de la Fundamento; W = Wackrill; G = Greka eldono; I = Itala eldono.

| | | |
|---|---|---|
| **12-a ekzerco.** 17-a frazo. | | |
| *dudek sepa* (8, G) | *dudek-sepa* (W, I) | (preferinda) |
| 18-a frazo: | | |
| *dudek dua* (8, G) | *dudek-dua* (W, I) | (preferinda) |
| *mil sepcent tridek dua* (8, G, W) | *mil-sepcent-tridek-dua* (I) | (preferinda) |
| **14-a ekzerco.** 5-a frazo: | | |
| *miljaron* (W, G, I) | *jarmilon* (8) | |
| **22-a ekzerco.** 1-a frazo: | | |
| *pura, ol akvo staranta* (8, G, I) | *pura, ol akvo, staranta* (W) | (malbona) |
| **33-a ekzerco.** 8-a frazo: | | |
| *Ni forte malestimas* (8) | *Mi forte malestimas* (W, G, I) | |
| **36-a ekzerco.** 7-a frazo: | | |
| **miaj** *frato kaj fratino* (8) | *mia frato kaj fratino* (W, G, I) | (malbona) |

(„**miaj**” estas grase presita en 8; „mia” estas ordinare presita en W, G, I.)

| | | |
|---|---|---|
| **41-a ekzerco.** 6-a frazo: | | |
| *nekredeblan* (8, G) | *ne kredeblan* (W, I) | |
| **42-a ekzerco.** 12-a frazo: | | |
| *sanigilo, resanigi* (8, G) | *sanigilo, sanilo, resanigi* (W, I) | (bona) |

Andreo ALBAULT.



025.45 : 408.92
*025.45 : 412*

## INDEKSO por Vol. 1-10 de Scienca Revuo laŭ BDK *)

de M. C. BUTLER

### ENKONDUKO

Jen laŭpete indekso (laŭ mia *Klasifo de Esperantaj Temoj)* de artikoloj en *Scienca Revuo* (Volumoj 1-10).

Por ĝin kompreni aŭ kritiki, necesas sin turni al la klarigoj en la verko mem (pp. 3-7, 133-140), aŭ minimume al la klarigoj donitaj en **S.R. 1** 108 kaj **8** 98. Ilin mi ne ripetos ĉi tie.

Devante klasifi tre detale 50 000 erojn por la Esperanta Biblioteko de la B.E.A., mi trovis kaj UDK kaj ĝian Sebertan modifon tute neadekvataj, kaj la proponitajn indicojn neoportune - eĉ ridinde - longaj kaj nepraktikaj. Cetere, por mil kaj unu detaloj ili faris nenian ajn provizon. Dum 40 jaroj mi do grade ellaboris la nunan klasifon.

Mi sekvis Seberton [laŭ lia *Modela Klasifiko* (pp. 6, 14, 18, 19) akorde kun la publikaĵo 91 (1908) de la Int. Instituto de Bibliografio], uzante 41 *internacia lingvo,* kaj 81 *internacilingva literaturo.* Por demandoj gramatikaj Dewey montriĝis pli taŭga bazo ol UDK. Mi nun rimarkigas simple:

(1) Por Esperanta lingvo kaj literaturo la precizaj indicoj estas = 12 kaj 812. Tamen, en la praktiko, = 1 kaj 81 plene sufiĉas. [Se iam ekzistus originala literaturo en alia i.l., la necesaj indicoj estas provizitaj.]

(2) 5 ŝajnas pli oportuna ol 001 por „scienco” (ambaŭ estas kritikeblaj, kiel tro aŭ nesufiĉe ampleksaj).

(3) Mi provizis indicojn uzeble koncizajn, tamen detalajn kaj klarajn. Ekz., por Teknikaj Terminoj en Esperanto, E 28 (anst. 001.4 = 089.2); por UEA, E 066 (anst. = 089.2 = 061.238 (100); por Scienca Revuo 5(05)SR (anst. 001(05) = 089.2(100)). (Kiel meti tiun kombinaĵon surdorse de volumo?)

(4) La Biskosignoj (Klasifo p. 14) montriĝis tre oportunaj por ĉion ordigi laŭ dato de eldono. Ekz., E„1902” S4 = E en 1902 (verko eldonita en 1924). Tamen, ĉar ili ne provizas por datoj post 1999, oni povas ilin pridubi.

(5) Kompreneble estas dezirinde, ke ĉiuj bibliotekoj uzu UDK same. Mi ne proponas modifon de UDK, sed nur, por *Esperantaj Bibliotekoj,* klasifon detalan kaj adekvatan por temoj alie neklasifeblaj.

(6) Kiu do insistas konservi UDK tute senŝanĝe, povas agi kiel montrite ĉe *Klasifo* p. 7.

*) Ĉi tiu listo ne pretendas kompletecon.